



Monumentoj de Unesko



Kulturaj kaj naturaj monumentoj en la Listo de la monda heredaĵo de Unesko

VLKOLÍNEC	monument-rezervejo de popola arkitekturo
LEŠTINY	evangelia artikola preĝejo
TVRDOŠÍN	romkatolika preĝejo Všetkých svätých
HRONSEK	evangelia artikola preĝejo
BANSKÁ ŠTIAVNICA	la urbo kaj teknikaj monumentoj de la ĉirkaŭaĵo
KEŽMAROK	la evangelia artikola preĝejo Kostol sv. Trojice
LEVOČA	historia centro de la urbo
SPIŠSKÝ HRAD	la burgo Spišský hrad kaj la ĉirkaŭaj monumentoj: Spišské Podhradie – centro de la vilaĝo, Spišská Kapitula kun la katedralo Katedrála sv. Martina, Žehra – la preĝejo Kostol sv. Ducha
HERVARTOV	la romkatolika preĝejo Kostol sv. Františka z Assisi
BARDEJOV	historia centro de la urbo
BODRUŽAL	la grekkatolika preĝejo Kostol sv. Mikuláša
LADOMIROVÁ	la grekkatolika preĝejo Kostol sv. Michala Archanjela
RUSKÁ BYSTRÁ	la grekkatolika preĝejo Kostol Prenesenia ostatkov sv. Mikuláša
VIHORLATSKE VRCHY	Karpataj fagaj praarbaroj (Vihorlatský prales)
BUKOVSKÉ VRCHY	Karpataj fagaj praarbaroj (Stužica, Rožok kaj Havešová)
DOBŠINSKÁ ĽADOVÁ JASKYŇA	glacia groto
OCHTINSKÁ ARAGONITOVÁ JASKYŇA	aragonita groto
GOMBASECKÁ JASKYŇA	karsta groto
JASKYŇA DOMICA	karsta groto
KRÁSNOHORSKÁ JASKYŇA	karsta groto
JASOVSKÁ JASKYŇA	karsta groto



Slovakio, lando de monda heredaĵo

Sorĉe rava arto ĉizita de la naturo mem, kuniĝanta kun fascinaj arkitekturaj perloj, atestas la buntan historion kaj la ĉarmon de la pitoreska lando Slovakio. Nekutima riĉeco je naturaj kaj kulturaj monumentoj kaŝiĝas en preskaŭ ĉiu regiono.

Misteraj netuŝitaj praarbaroj, raraj subteraj reĝlandoj, mitoplenaj verkoj kiuj rakontas majestajn historiojn de la pasinteco, antikvaj urboj kun vidindaj memorindaĵoj, imponaj artefaktoj de popolarto... Ĉio ĉi ilustras la unikecon de tio, kion ofertas Slovakio.

Ok eksterordinaraj slovakaj trezoroj jam havas neanstataŭigeblan

lokon inter la elstaraj monumentoj enskribitaj en la Liston de la monda heredaĵo de Unesko. Ĉu vi ekiros laŭ la spuroj de malproksima pasinteco ĝis unu el la belegaj historiaj urboj Bardejov, Levoča aŭ Banská Štiavnica, aŭ vi esploros la unikajn artajn majstraĵojn de la grotoj de la karsta montaro Slovenský kras, aŭ vi lasos vin ravi de la sorĉa muziko de la tradicia ligna muzikilo *fujara*, vizitos la agrabletosan vilaĝeton Vlkoľínec, sekvos la spurojn de la unikaj lignaj preĝejetoj de la Karpata montararko, ĉirkaŭrigardos la mondon de la romantikaj ruinoj de la burgo Spišský hrad, aŭ promenos en la majesta naturo de la fagaj praarbaroj, ĉiu el je-

naj unikaĵoj certigas neforgeseblajn kaj fascinajn spertojn.

Vi tenas en la manoj gvidlibron pri tiuj ĉi nekutimaj monumentoj, kies vizito iĝos por vi neforgesebla travivaĵo.

Malkovru landon, kies ĉarmo ravas ĉiujn, ekkonu ĝiajn unikaĵojn, vizitu la **nacian retpaĝaron** – lokon, kie vi ekscios pri Slovakio ĉion kion vi ĝis nun eĉ ne suspektis kaj kion vi ĉiam deziris scii:

www.slovakia.travel



Banská Štiavnica

La arĝenta urbo

Banská Štiavnica, urbo situanta rekte en la mezo de vulkano en la montaro Štiavnické hory, estas magia kaj mitoplena loko kie homoj kaj naturo unuiĝis dum sia kunekzistado. Štiavnica enhavas nevideblan magion kaj allogas per komforta, familia etoso vizitantojn trosatigitajn de la bruo de la grandaj urboj. Ĝuste pro la unika ĉarmo de la pitoreska pejzaĝo la urbo kaj la teknikaj monumentoj en la ĉirkaŭaĵo estis aldonitaj al la Listo de monda heredaĵo de Unesko.

Štiavnica, en pasinteco nomata ankaŭ la Arĝenta urbo, estis Eldorado, en kiun alkuradis por serĉi oron kaj arĝenton

Eŭropaj aventuristoj, ankaŭ turkoj kaj rabistoj. Dum kelkaj jarcentoj ĝi estis trezorejo de Aŭstrio-Hungario kaj unu el la plej konataj urboj en Eŭropo. Per la riĉaĵoj de la subtero oni financis konstruigon de grandiozaj palacoj en Vieno kaj Budapeŝto, pompan vivon de la imperiestra kortego, oni progresigis sciencon, instruadon kaj kulturon, oni financis militojn.

Iam, kiel la tria plej granda urbo de Hungario, Štiavnica estis ankaŭ loko de la plej alta klereco. Ĝuste tie oni unuafoje en la mondo uzis pulvon por eksplodigi rokon, kaj ĝuste tie Maria Teresia fondis la unuan teknikan alt-

lernejon en la mondo. Danke al tio povis aperi ankaŭ unika sistemo de sesdek interkonektitaj homkonstruitaj lagoj nomitaj *tajchy*, kie la forto de akvo mem estis uzata por forĉerpadi ĝin el inunditaj minoj, ankaŭ por funkciigi la aparatojn kiuj prilaboris ercojn. La riĉaj loĝantoj de Štiavnica invitis al la urbo elstarajn arkitekturojn, kiuj konstruis por ili palacojn sur krutaj deklivoj. La montaro Štiavnické vrchy estas truple kiel ementala fromaĝo. En la urbocentro preskaŭ ĉiu domo havas kaŝitan enirejon en la subteron. Ĝi estas misterplena kaj potenca loko.



Eblas minveturi rekte en la urbo aŭ en la mineja subĉiela muzeo iom malantaŭ ĝi. La vizitantoj povas serĉi mineralojn kaj aŭskulti anekdotojn pri “minejumado” en malnovaj tempoj. Inter la ĉefaj vidindaĵoj de la urbo estas sendube ankaŭ kalvario, unu el la plej belaj barokaj kalvarioj en Eŭropo, kiu troviĝas sur la monteto Ostrý vrch, rekte en la centro de la vulkano.

Ankaŭ la kultura oferto de Banská Štiavnica havas eksterordinare altan nivelon, okazas ĉi tie unikaj etaj film-kaj muzik-festivaloj, koncertoj kaj interesaj eventoj por infanoj.

La rava ĉirkaŭa pejzaĝo, trateksita per markitaj turismaj vojoj kaj biciklaj vojoj kun belegaj elvidoj, estas same ĉarma kiel la urbo mem. La artefaritaj lagoj hodiaŭ estas uzataj por banado kaj boatumado, vintre por glitkurado. La kanaletoj, kiuj iam de montetoj kolektadis kaj al la lagoj prenadis pluvakvon, iĝis promenejoj kaj montaraj biciklovojoj. Indas promeni en la pitoreska ĉirkaŭaĵo, kiu estas plena je romantikaj anguletoj. Je ĉiu paŝo eblas trovi spurojn de la fora mina pasinteco, hodiaŭ harmonie enigitajn en la pejzaĝon.

Ekskursaj rekomendoj

Kasteleto en Svätý Anton – iama sidejo de bulgara caro kun kolekto de mebloj el la tuta mondo kaj kun ĉasista ekspozicio

Banejo Sklené Teplice – kun kuraĉa akvo en naturdevena groto

Kremnica – antikva mina urbo kun la plej malnova seninterrompe funkcia monfarejo en la mondo

Informcentro de la urbo Banská Štiavnica

Námestie sv. Trojice 6
969 01 Banská Štiavnica
Tel.: +421 45 694 96 53
+421 45 692 05 35

ic@banskastiavnica.sk
www.banskastiavnica.sk
www.banskastiavnica.org
N 48°27'34.79" E 18°53'34.04"



Vlkolíneček

Pulsanta per tradicioj

Vlkolíneček estas ĉarma vilaĝeto situanta meze de la belega naturo de Liptov, en kiu vizitantoj povas per la tuta animo senti unikan etoson plenan je konindaj tradicioj kaj neripebla historio. Temas pri la plej bone konservita monumentrezervo de popola arkitekturo en Slovakio. Danke al unikaj originaj lignaj konstruaĵoj ĝi estis en 1993 aldonita al la Listo de la monda heredaĵo de Unesko.

Tiu ĉi karakteriza submonta vilaĝo, gardata de la rokoj de la monto Sidorovo, troviĝas ĉe la piedo de la kresko de la nacia parko Národný park

Veľká Fatra, proksimume tri kilometrojn de la urbo Ružomberok. Laŭ legendoj la nomo de Vlkolíneček devenas de la ĉeesto de lupoj (slovake *vlk*) en la regiono. Aliaj fontoj mencias, ke la vilaĝo estis nomita laŭ lupaj truoj (*vlčie jamy*) malkovritaj tie. Temis pri kaŝitaj truoj kun paliso en la fundo, antaŭe uzataj ĉefe por kapti sovaĝajn bestojn, sed ankaŭ kiel defendo kontraŭ nedezirataj vizitantoj. La loĝantoj de tiu ĉi eksterordinare pitoreska vilaĝeto vivtenis sin ĉefe per agrokulturo, ŝafbredado kaj arbohakado. Ili utiligadis siajn kapablojn prilabori lignon ankaŭ dum kons-

truado de siaj domoj, kiuj konserviĝis en sia origina stato ĝis hodiaŭ. La eta montara vilaĝo kvazaŭ spitas tempon kaj ajnajn ŝanĝojn, kion pruvas pli ol 40 idiliaj lignaj konstruaĵoj – ĉarmaj trabaj dometoj sur ŝtonaj bazoj kun muroj ŝmiritaj per argilo kaj kun tegolaj tegmentoj.

Inter la ĉefaj vidindaĵoj de Vlkolíneček troviĝas duetaĝa ligna sonorilturo el la jaro 1770 starigita sur ŝtona bazo, valora traba puto el 1860 kaj la barokklasika romkatolika preĝejo Kostol Navštívenia Panny Márie. Al la ĉarma etoso kontribuas eta roĵo fluanta en



ligna kanaletoj tra la vilaĝo. Troviĝas ĉi tie ankaŭ tipa kamparana traba domo, kiu estas parto de ekspozicio de la muzeo Liptovské múzeum, kaj vizitantoj povas en ĝi lerni pri la origina vivmaniero de kampara familio en la teritorio de Dolný Liptov.

Nuntempe vivas en la eksterordinara vilaĝo proksimume dudek loĝantoj, kiuj estimas kaj revivigas la tradiciojn de siaj prauloj. Dum jaro okazas ĉi tie kelkaj interesaj kulturaj kaj

sociaj eventoj, kiuj pliproksimigas al vizitantoj la tradicion vivmanieron, la popolan arton, la folkloron kaj la kutimojn de la ĉi-tieaj homoj.

La hejmeca vilaĝo Vlkolínec, malgraŭ sia aspekto, ne estas muzeo, sed danke al la obstina spito al modernigo ĝi estas vivplena kaj siaspeca loko kun ĉarma etoso, ofertanta al ĉiuj vizitantoj nekutiman travivaĵon kun gusto de aŭtenta historio kaj unikaj tradicioj.

Ekskursaj rekomendoj

Arkeologia subĉiela muzeo Havránok kun montroj de kelta setlado ĉe la bordo de Liptovská Mara, la plej granda baraĵlago en Slovakio kun multe da diversaj akvaj sportoj
Malinô Brdo – turisma centro kun multaj allogaĵoj dum la tuta jaro (skiado, biciklejo, ŝnurgrimpado ktp.)

Termobanejo en Bešeňová kaj akvoparko en Liptovský Mikuláš – amuziĝo kaj ripozo en varma akvo dum la tuta jaro

Informcentro de Ružomberok

A. Bernoláka 1
034 01 Ružomberok
Tel.: +421 44 432 10 96
info@ruzomberok.eu
www.ruzomberok.eu
www.vlkolinec.sk
N 49°02'15.97" E 19°16'34.97"



Levoča, Spišský hrad kaj la ĉirkaŭaĵo

Juveloj de Spiš

En la belega medio de Spiš, unu el la orientslovakiaj regionoj plej vizitataj de turistoj, etendiĝas monde grava teritorio. Belegan vidon al la ĉirkaŭaĵo ofertas la ĉefa rimarkindaĵo de la pitoreska regiono: la burgo Spišský hrad, staranta sur la plej granda kalka roko.

Ŝatantoj de historio kaj de perpieda turismumado povas kunigi ekskurson al ĝi kun vizito de pluraj vidindaĵoj en la ĉirkaŭaĵo, kun kiuj la burgo estis aldonita en 1993 al la Listo de la monda heredaĵo de Unesko. La unikecon de la komplekso de la senkomparaj mo-

numentoj substrekis en 2009 ankaŭ enskribo de la historia centro de la plej grava urbo en la regiono, Levoča, kune kun la verko de la malfrugotika lignoskulptisto Majstro Pavol. En la kampo de kultura heredaĵo troviĝas ĉi tie vere multe da vidindaĵoj.





Altaro de Majstro Pavol el Levoča

Levoča

La Mezepoka reĝurbo Levoča, situanta en oriento de la regiono Spiš sub la montaro Levočské vrchy, estas danke al la riĉa pasinteco unu el kulturhistoriaj juveloj de Slovakio. La ĝis hodiaŭ konservita urba murego gardas aron da raraj arkitekturaj monumentoj ligitaj kun la glora historio de la urbo.

Promeno tra la vasta oblongforma placo, kie krom vidindaj domoj de urbanoj troviĝas ankaŭ unu el la plej signifaj religiaj konstruaĵoj en Slovakio, la preĝejo Chrám sv. Jakuba, garantias perfektan estetikan sperton. La interno de la preĝejo, senkompara

kolekto de sakrala arto, estas ornamita per unika ligna gotika altaro, kiu devenas de la metiejo de Majstro Pavol el Levoča kaj kiu estas kun la alto de 18,62 m la plej alta siaspeca altaro en la mondo.

Alloga estas ankaŭ la muzeo situanta en la konstruaĵo de la iama urbo-domo de Levoča. Tiu estas unu el la plej elstaraj konstruaĵoj de la sekulara Renesanca arkitekturo en Slovakio. La muzeo Spišské múzeum ofertas imponan rigardon al la historio de la urbo, sed ankaŭ kelkajn aliajn interesajn ekspoziciojn. La plej vizitataj estas la burgo Spišský hrad kaj la ekspozicio de Majstro Pavol el Levoča.

Ĉiujare, komence de julio, Levoča fariĝas la loko de la plej granda renkontiĝo de pilgrimantoj en Slovakio. Dekmiloj da kredantoj en longaj vicoj supreniras la monton Mariánska hora, kiu etendiĝas super la urbo, por komune preĝi en la novgotika preĝejo Kostol Navštívenia Panny Márie.

Informoficejo de la urbo Levoča

Námestie Majstra Pavla 58
054 01 Levoča
Tel.: +421 53 16 188, 53 451 37 63
ikle@levoca.sk
www.levoca.sk
N 49°01'31.60" E 20°35'19.33"



Spišský hrad kaj Spišská Kapitula

La burgo Spišský hrad kaj la ĉirkaŭaj monumentoj

La historia ĉefelemento de Spiš estas komplekso konsistanta el la burgo Spišský hrad, el Spišská Kapitula, Spišské Podhradie kaj el la preĝejo Kostol sv. Ducha en Žehra. La bona konserviteco kaj eksterordinareco de tiuj ĉi altvaloraj monumentoj, kune kun la ĉirkaŭa natura zono de travertina teritorio de la nacia natura rezervejo Dreveník, kunkreas senkomparan tuton kies vizito promesas unikan travivaĵon.

La burgo

Sur pli ol kvarhektara surfaco etendiĝas unu el la plej grandaj burg-ruinaĵ kompleksoj en Mez-Eŭropo, kiun multaj konsideras nacia simbolo de Slovakio: Spišský hrad.

Tiu ĉi nacia kultura monumento, staranta sur travertina roko 634 metrojn super maro, datiĝas de la 12-a jarcento. Ĝia strategia situo sur la burga monto destinis ĝin ekde komenco por defenda funkcio. La grava ĉelima fortikaĵo poste fariĝis centro de la reĝa potenco en Spiš kaj loĝloko de altranguloj. La burgo plej multe floris en la 15-a jarcento, kiam ĝi fariĝis reprezenta loĝejo de nobelularo. Danke al fortikaj muregoj, altaj rokoj kaj pluraj defendaj elementoj ĉirkaŭantaj ĝin tiu ĉi kuraĝa kaj senkompromisa gardanto de Spiš neniam estis konkerita. Detrua fajrego en la jaro 1780 tamen transformis la grandiozan burgon en ruĥon. Danke al riĉa historio, perfekta situo kaj impona grandio la burgo iĝis

ne nur dominanto de la tuta regiono kaj populara turisma vidindaĵo, sed ankaŭ allogaĵo por multaj filmistoj, fotistoj kaj pentristoj.

En la rekonstruitaj partoj de la burga komplekso troviĝas nuntempe la ekspozicioj de la muzeo Spišské múzeum, kie vizitantoj povas vidi spurojn de la riĉa historio, ekscii multajn interesajn informojn pri la historio de la burgo kaj pri Mezepokaj armiloj, aŭ rigardi Mezepokan kuirejon, burgan dormoĉambron aŭ torturejon. En aŭtenta tiama etoso okazas en la burgo ĉiujare, ĉefe dum someraj monatoj, multe da impresaj kaj interesaj kulturaj eventoj. Turistojn aparte allogas montroj de historiaj batalartoj kaj de falkĉasado.



Spišské Podhradie

Vido al la majesta fortikaĵo el birda perspektivo estas neforgesebla sperto por vizitantoj. Sub la burgo eblas ankaŭ admiri unu el la plej grandaj skulptaj verkoj en la mondo. Eksterordinara terdesegneco de Aŭstralia skulptisto farita el ŝtonoj bildigas ĉevalon el kelta monero malkovrita dum arkeologiaj esploroj en la burgo.

Spišské Podhradie

Sub la majesta burgo Spišský hrad, proksime al Spišská Kapitula, troviĝas 430 m super maro la provinca urbeto Spišské Podhradie, iama grava metia centro. La vizitantoj povas admiri ne nur la

gotik-Renesancajn domojn de urbanoj kun tipaj subirejoj kaj grandaj pordegoj, kiuj borderas la stratojn kaj placojn de Spišské Podhradie, sed ankaŭ multajn rimarkindajn religiajn konstruaĵojn. La preĝejo Kostol Narodenia Panny Márie kaptas atenton per la valora gotika ala altaro de Sankta Barbara. En la urbo troviĝas ankaŭ Renesanca urbodomo, preĝejo kaj monaĥejo de bonfaraj fratuloj rekonstruita en baroka stilo kaj la baroka kolono Mariánsky stĺp.


La pilgrima kapelo, staranta sur la pinto de malalta travertina monteto proksime al Spišské Podhradie, estas natura rezervejo donanta ravan vidon al katedralo kaj al la burgo.

Ekskursaj rekomendoj

Instrua pado Sivá Brada – Dreveník sekvanta la spurojn de historio kaj naturajn interesaĵojn de la regiono Spiš

Nacia parko Národný park Slovenský raj – ebloj por turismado en belega medio kun multaj lignaj kaj feraj eskaloj, ravinoj, akvofaloj kaj vizito de la karsta glaci-groto Dobšinská ľadová jaskyňa


Kastelo Betliar – fabeleca duetaĝa tipa ĉasista domo konstruita en belega anglastila parko kun romantikaj konstruaĵoj, artefarita groto kaj akvofalo



Spišská Kapitula

Okcidente de Spišské Podhradie troviĝas interesa urba monument-rezervejo Spišská Kapitula. La iama eklezia urbeto, nomata ankaŭ “slovaka Vatikano”, ekestis en vojkruciĝo de gravaj vojoj sub la burgo Spišský hrad. Hodiaŭ ĝi estas la sidejo de la revivigita episkopujo de Spiš.

La katedralo Katedrála sv. Martina estas valora gotika fieraĵo de Spišská Kapitula. Tiu ĉi origine romanika konstruaĵo, foje uzita kiel reĝa templo, akiris sian hodiaŭan grandiozan aspekton pro multaj rekonstruoj kaj ĝi hodiaŭ kontribuas al la pitoreskeco de la ĉirkaŭa regiono, plena je kultur-historiaj juveloj.





Turisma informcentro de Spišská Nová Ves

Letná 49, 052 01 Spišská Nová Ves
Tel.: +421 53 16 186, 53 429 82 93

tic@spisskanovaves.eu
www.spisskanovaves.eu

Levoča:
N 49°01'31.60" E 20°35'19.33"
Spišský hrad:
N 49°00'01.47" E 20°46'05.81"
Spišské Podhradie:
N 48°59'59.85" E 20°45'06.05"
Spišská Kapitula:
N 48°59'56.20" E 20°45'11.00"
Žehra:
N 48°58'43.46" E 20°47'34.04"
Dreveník:
N 48°58'55.66" E 20°46'28.03"

La preĝejo Kostol sv. Ducha en Žehra

La komplekson de la monda kultura heredaĵo en Spiš kompletigas la romkatolika preĝejo Kostol sv. Ducha en Žehra, kiu estas utiligata ĉefe por diservoj, sed ĝi estas vizitinda ankaŭ pro sia unika interno. La per arta bildigo valoraj kaj unikaj murpentraĵoj devenantaj el diversaj jarcentoj bildigas diversajn bibliajn rakontojn. La tipa bulboforma tegmento de tiu ĉi nacia kultura monumento estas bone rekonebla eĉ de la burgo Spišský hrad.

Super la municipo Žehra troviĝas unu el la plej grandaj kaj plej malnovaj travertinaj formaĵoj en Slovakio, la naturrezervejo Dreveník. Multaj arkeologiaj trovaĵoj kaj ĉeesto de maloftaj specioj de kreskaĵoj certigas al Dreveník lokon inter la plej allogaj turismaj celoj en Spiš. Supreniro sur la monteton mem ofertas sorĉe belan vidon al la montaroj Branisko kaj Levočské vrchy, kiu kontribuas al la ĉarma natura kuliso de la burgo Spišský hrad.



Bardejov

La gotika perlo de Šariš

Nur malmultaj urboj en Slovakio povas fieri pri tioma kvanto da eksterordinaraj raraj monumentoj kiel ĝuste Bardejov. Jam en 1986 ĝi estis la unua urbo en Slovakio, kiu ricevis de la Internacia kuratorujo de la fondaĵo ICOMOS ĉe Unesko prestiĝan Eŭropan premion, oran medalon. Sekve, en 2000, tiu ĉi Šariš-regiona urbo kun pli ol 770-jara historio estis enskribita en la Liston de la monda heredaĵo de Unesko, danke al kio la unika historia kerno de Bardejov kune kun la komplekso de judaj konstruaĵoj iĝis vera perlo de la monda kulturo.

La urbo Bardejov, kies senduba fieraĵo estas monumentoj konstruitaj en Mezepoko, estis unuafoje skribe menciita en 1241. Tiutempe ĝi estis parto de grava komerca vojkruĉiĝo kaj pro tio ĝi ricevis diversajn rajtojn kaj privilegiojn. La plej grava el la privilegioj estis donita en 1376, kiam Bardejov fariĝis libera reĝurbo.

Hodiaŭ oni povas en la plej gotika urbo de Slovakio admiri unu el la plej bone konservitaj urbaj fortikaĵoj, kiu pro sia graveco iĝis parto de la Eŭropa fonduso por kultura heredaĵo. La ĉefa elemento de la plaĉa oblongforma ĉefplaco,



ĉirkaŭata de originaj domoj kun tipaj selformaj tegmentoj, sendube estas la rimarkinda gotika preĝejo Bazilika minor sv. Egídia el la 14-a jarcento. La interno de la preĝejo ĉarmos la vizitantojn per unika aro da dek unu malfrugotikaj alaj altaroj, el kiuj kelkaj estas konsiderataj elstaraj ekzemploj de Eŭropa lignoskulptado. Plia eksterordinara konstruaĵo sur la placo estas la meze situanta gotik-Renesanca konstruaĵo de la urbodomo kun interesa ekspozicio de la muzeo Šarišské múzeum.

Proksime al la urbocentro troviĝas urba kuriozaĵo de orienta Slovakio: la



unusola parte konservita aro da iamaj judaj banejoj kaj sinagogo, restaĵo de suburba centro el la fino de la 18-a jarcento konstruita en planita maniero, laŭ talmudaj preskriboj.

Neevitebla kaj nedisigebla parto de la urbo Bardejov estas la banejo Bardejovské kúpele, kiu apartenas al la plej belaj kaj plej popularaj banlokoj en Slovakio. Pluraj historiaj famuloj vizitis tiun ĉi oazon de sano kaj ripozo, ekzemple Marie-Louise, la dua edzino de la imperiestro Napoleono la 1-a, la rusa caro Aleksandro la 1-a aŭ la imperiestrino Elizabeto, edzino de Francisko Jozefo la 1-a, konata ankaŭ kiel Sissi.

Bardejov ofertas al siaj vizitantoj dum la tuta jaro riĉan kulturen kaj socian vivon. Inter la plej konataj eventoj organizataj de la urbo estas Rolandoj (ludoj de la kavaliro Roland), Organovoj (internacia festivalo de orgena muziko) kaj ankaŭ tradicia datrevena foiro en la lasta semajno de aŭgusto, kies historio komenciĝis en la 14-a jarcento.



Ekskursaj rekomendoj

Lignaj preĝejoj – multaj arkitekture unikaj lignaj preĝejoj, el kiuj kelkaj troviĝas en la Listo de la monda heredaĵo de Unesko

La burgo Ľubovňa – burgo kun riĉa historio, interesa arkitekturo kaj alloga programo dum somero

Levoča, la burgo Spišský hrad kaj la ĉirkaŭaj monumentoj – mondaj arkitekturaj unikaĵoj en la Listo de la monda heredaĵo de Unesko

Turismo-informa oficejo de Bardejov

Radničné námestie 21
085 01 Bardejov
Tel.: +421 54 474 40 03
tikbardejov@proxisnet.sk
www.tik-bardejov.sk
www.bardejov.sk
N 49°17'30.62" E 21°16'35.26"



Tvrdosín


Lignaj preĝejetoj

Unikaj religiaj perloj

En la teritorio de Slovakio troviĝas pli ol 40 senkomparaj lignaj religiaj konstruaĵoj, el kiuj ok plej altvaloraj estis enskribitaj en 2008 en la Liston de la monda heredaĵo de Unesko. La lignaj romkatakaj preĝejetoj en Hervartov kaj Tvrdosín, la evangeliaj artikolaj temploj en Kežmarok, Leštiny kaj Hronsek kaj la sanktejoj de orienta liturgio en Bodružal, Ladomirová kaj Ruská Bystrá apartenas al la plej grandaj kaj plej interesaj religiaj perloj en la slovakia parto de la Karpata montararko.

Multaj lignaj preĝejetoj, ĝis hodiaŭ uzataj por religiaj celoj, estis konstruitaj nur per ligno, sen eĉ unu metala najlo. Ankaŭ la vidinda interno kaj la interna ornamo de la preĝejoj estas lignaj, kio substrekas la eksterordinarecon de ĉi tiuj raraj konstruaĵoj.

Fieraĵo de la oravia urbo **Tvrdosín** kaj ĝia plej malnova konservita monumento estas sendube la gotika ligna preĝejo **Kostol všetkých svätých** kun valora baroka altaro kaj belegaj volbaj pentraĵoj.



Tvrdosín



Leštiny

En la karakteriza regiono Oravio kaŝiĝas trezoro, la ligna artikola **preĝejo en Leštiny**. Ĝia interno estas riĉe ornamita, dominas en ĝi

floraj murpentraĵoj, riĉe ornamita predikejo kaj valora baroka altaro kun belega lignoskulptaĵo.

Ekskursaj rekomendoj

La burgo Oravský hrad – unu el la plej multe vizitataj burgoj en Slovakio, boatumado sur flosoj laŭ la rivero Orava

Podbiel – monumento-rezervejo de popola arkitekturo

Zuberec – muzeo Múzeum oravskej dediny kun tipa arkitekturo de la regiono Oravio



Leštiny

Turisma informoficejo de Dolný Kubín

Hviezdoslavovo námestie 1651/2

026 01 Dolný Kubín

Tel.: +421 43 581 44 70

Poŝtel.: +421 915 049 407

tik@orava.sk

www.dolnykubin.sk (nur en la slovaka)

Tvrdošín:

N 49°20'11.64" E 19°33'29.31"

Leštiny:

N 49°11'18.92" E 19°20'58.85"




Hronsek

La ĉirkaŭaĵo de la historia, origine mineja urbo Banská Bystrica ofertas al siaj vizitantoj veran juvelon en la proksima vilaĝo **Hronsek**. Apartaĵo de la loka ligna **artikola preĝejo** el la jaro 1726 estas ĝia traba konstruo. La interno ravas per nekutima altaro kun ses ŝanĝeblaj bildoj, amfiteatre aranĝitaj ĥoraj benkoj kaj bonega akustiko. En belega medio sub la pintoj de Altaj

Tatroj (Vysoké Tatry), en la historia urbo **Kežmarok**, eblas trovi la barokan lignan preĝejon **Kostol sv. Trojice**, kiu estis konstruita en la formo de egalbranĉa greka kruco. Ĝi estas unu el la plej vidindaj kaj impresaj lignaj preĝejoj kaj ĝi enhavas plaĉajn lignoskulptaĵojn, rarajn freskojn, belegan imponan lignan altaron kaj altvaloran preĝejan orgenon kun lignaj tuboj.

Ekskursaj rekomendoj

La kastelo Zvolenský zámok – la dominanto de la urbo Zvolen kun kolektoj el la slovaka nacia galerio **Banská Bystrica** – historia urbo kun multaj allogaĵoj kaj eventoj **Tatranská magistrála** – turisma vojo laŭ la sudaj deklivoj de Altaj Tatroj



Kežmarok



Kežmarok

Informcentro de Banská Bystrica

Námestie SNP 1
974 01 Banská Bystrica
Tel.: +421 850 003 004
+421 48 41 55 085
Poŝtel.: +421 907 846 555
ic@banskabystrica.sk
www.icbb.sk

Informa agentejo de Kežmarok

Hlavné námestie 1, 060 01
Kežmarok
Tel.: +421 52 449 21 35
info@kezmarok.sk
www.kezmarok.sk


Hronsek:
N 48°38'56.72" E 19°09'18.56"
Kežmarok:
N 49°07'59.17" E 20°25'42.65"



Ladomirová



Ladomirová



Ruská Bystrá

En **Hervartov**, pitoreska vilaĝo de la regiono Šariš, troviĝas la plej malnova kaj plej bone konservita ligna preĝejo konstruita en la 15-a jarcento, **Kostol sv. Františka z Assisi**, en kiu oni povas admiri belegajn, pure gotikajn ikonojn kaj murpentraĵojn.

La teritorio de orienta Slovakio povas ja fieri pri pluraj unikaj lignaj preĝejoj, sed la preĝejo **Chrám sv. Mikuláša** en **Bodružal** estas unu el la plej malnovaj kaj plej bone konservitaj temploj de orienta liturgio en Slovakio. Tiu ĉi admirinda triparta traba konstruaĵo kaŝas unikan ikonostazon deambaŭflanke pentritan.

Unu el la plej belaj lignaj preĝejoj de orienta liturgio en Slovakio, la grek-katolika preĝejo **Kostol sv. Michala Archanjela**, troviĝas proksime al la urbo Svidník, en la impresa vilaĝo **Ladomirová**. La interno de la preĝejo ofertas arte valorajn kaj riĉe gravuritajn kaj pentritajn ikonostazon kaj altaron de la 18-a jarcento.

Tre proksime al la ukraina landlimo, en la pitoreska vilaĝo **Ruská Bystrá**, estis konstruita en 1730 traba grek-katolika ligna preĝejo **Kostol Prenesenia ostatkov sv. Mikuláša**, kiu distingiĝas arkitekture de la aliaj temploj de orienta liturgio. La internon ornamas valora, unika ikono de la krucumo.



Bodružal

Ekskursaj rekomendoj

Bardejov – gotika urbo (Unesko) kun banejo kaj subĉiela muzeo de popola arkitekturo

Medzilaborce – muzeo de moderna arto de Andy Warhol

Humenné – ekspozicio de popola arkitekturo, kulturaj monumentoj

Turismo-informa oficejo de Bardejov

Radničné nám. 21, 085 01 Bardejov
Tel.: +421 54 474 40 03
tikbardejov@proxisnet.sk
www.tik-bardejov.sk

Porklienta kaj informa centro de Humenné

Staničná 1, 066 01 Humenné
Tel.: +421 57 788 10 51
zc.humenne@stonline.sk
www.humenne.sk

Hervartov:

N 49°14'47.64" E 21°12'14.68"

Bodružal:

N 49°21'09.05" E 21°42'28.81"

Ladomirová:

N 49°19'42.04" E 21°37'34.80"

Ruská Bystrá:

N 48°51'24.18" E 22°17'48.35"




Grotoj

La subtera riĉeco de Slovakio

Slovakio ofertas al siaj vizitantoj senkomparan belecon de unikaj artaĵoj verkitaj de la plej talenta majstro, kiu iam ekzistis: de naturo. Belegaj ekspoziciaj ejoj kun misterplenaj kaj senspirigaj bunte ornamitaj juveloj troviĝas rekte tie, kie ili naskiĝis, sub la surfaco de ĉi tiu pentrinda lando.

Nur en malmultaj lokoj oni trovas tioman eksterordinaran kvanton da diversaj karstaj formaĵoj, kiel ĝuste en Slovakio. En la lando troviĝas 6 200 konataj grotoj, el kiuj 18 estas malfermitaj al la publiko. La plej signifaj





Gombasecká jaskyňa

kaj konataj troviĝas en la Listo de la monda heredaĵo de Unesko. Temas pri la grotoj de Slovenský kras kaj Aggtelekský kras, kiuj estis enskribitaj inter mondajn naturajn unikaĵojn en 1995. En 2000 aldoniĝis la glacia groto Dobšinská ľadová jaskyňa.

En la mondo ekzistas nur tri alireblaj aragonitaj grotoj. Krom Mek-siko kaj Argentino ankaŭ Slovakio povas fieri pri unu el ili. **Ochtinská aragonitová jaskyňa** havas eksterordinare altan estetikan valoron kaj estas la unusola tiaspeca en Eŭropo. Ĝi troviĝas sub la montaro Revúcka vrchovina, ĉe la norda deklivo de la monto Hrádok, proksimume 26 km de la urbo Rožňava. Temas pri unika natura fenomeno, kiu havas nekutime diversspecajn, riĉajn kaj belajn aragonitajn ornamojn. Ĝiaj subteraj spacoj alirebligataj por la publiko en proksimume 300-metra longo estas ornamitaj per aragonitaj kristaloj aranĝitaj tiel, ke ili memorigas pri delikataj koraloj kaj elegantaj maranemonoj ŝvebantaj sur la volboj de la


groto. Oni supozas, ke la plej malnovaj partoj de la aragonitaj formaĵoj havas nekredeblan aĝon: 138 000 jarojn. La impona ŝtona beleco, formita dum longaj jarmiloj, hodiaŭ donas al vizitantoj mirindan sperton.

Domica estas la plej granda konata groto en Slovenský kras, en unu el la plej ampleksaj karstaj teritorioj en centra Eŭropo. Ĝi troviĝas ĉe la

slovakia-hungaria landlimo, ĉirkaŭ 25 km de Rožňava. Ĝia internaĵo, profundigita de la plurjarcenta efiko de la akvo de la riveroj Styx kaj Domický potok, estis prilogata de homoj jam antaŭ 35 000 jaroj. Krom bela kaj riĉa kalkotofa interno, tipaj pintaj ŝtonoj, elstaraĵoj kaj imponaj kaskadaj akvofaloj oni povas ankaŭ, kaze de sufiĉa akvofluo, sperti tre popularan boatumadon laŭ la rivero Styx.



Krásnohorská jaskyňa



Jasovská jaskyňa



Dobšinská ľadová jaskyňa

La groto **Gombasecká jaskyňa** troviĝas ĉe la piedo de la altebenaĵo Silická planina, ĉirkaŭ 10 km de Rožňava. Ĝi konsistas el du etaĝoj, kreitaj de la agado de la rivero Čierny potok kaj de ĝiaj alfluantoj. La 1 525 m longa subtera templo estas elstara pro sia nekutima kalkotofa ornamo en la formo de unikaj maldikaj tubaj stalaktitoj. En kelkaj lokoj ili atingas 3-metran longon kaj estas tiel multenombraj, ke ili similas al belega ŝtona pluvo.

La groto **Jasovská jaskyňa** etendiĝas rande de la vilaĝo Jasov, en la montetaro Medzevská pahorkatina, en la okcidento de la kaldrono Košická kotlina. Ĉambregoj, ŝtonaj akvofaloj kaj koridoroj kun riĉa blanka, grizbruna kaj brunruĝa kalkotofa ornamo estis fositaj fare de la rivereto Bodva. Danke al humideco de 90–98 % okazas en ĝi sanigaj grot-klimataj restadoj.

La groto **Krásnohorská jaskyňa**, en la norda rando de la altebenaĵo Silická planina, estas vizitebla nur kun speleologo. Ĝia unikaĵo, monumenta kolono Kvapel rožňavských jaskyniarov, estas kun alto 32,6 m kaj baza diametro 12 m unu el la plej grandaj kalkotofaj formaĵoj en la mondo, kaj ĝi estas ankaŭ la plej granda en la mezvarmklimata zono.

La glacia groto **Dobšinská ľadová jaskyňa** apartenas pro karaktero de sia glaciĝo al la plej gravaj grotoj en la mondo. Ĝi estas des pli unika pro tio, ke ĝi estas la plej malalte situanta el ĉiuj mondfamaj glaciaj grotoj. Ĝi troviĝas nur ĉirkaŭ 920 m super maro, proksimume 20 km de la vilaĝo Dobšiná en la karsto Spišsko-Gemerský kras, en la nacia parko Národný park Slovenský raj. La nekredebla glacia interno, konsistanta el pli ol 110 000 kubmetroj da glacio, estas en kelkaj lokoj 25 m dika kaj etendiĝas sur preskaŭ 10 000 kvadratmetroj. La ĉefa parto de la groto konsistas el grandega kavo, kiu mal-supreniras de la surfaca enirejo ĝis 70-metra profundo. Tiu ĉi grandega subtera glaĉero ofertas al vizitantoj ne nur plankan glacieron, sed ankaŭ belegajn glaciajn kolonojn, sorĉajn glacifalojn kaj stalagmitojn. La aera temperaturo en la malaltaj partoj de la groto restas sub la frostpunkto dum la tuta jaro.

Jen la eksterordinaraj grotoj de Slovakio – belegaj naturaj unikaĵoj, lokoj vualitaj per senkompata mallumo, kie lumradioj ebligas al vizitantoj malkovri la misterplenajn belaĵojn de subtero kaj la nekutiman arton de naturo.

Ekskursaj rekomendoj

La urbo Košice (Eŭropa kultura ĉefurbo en 2013) – gotika katedralo de Sankta Elizabeto en eksterordinara historia placo, multe da kulturaj monumentoj kaj eventoj
Banejo Štós – klimata banejo en la koro de pitoreska naturo
Nacia parko Národný park Slovenský kras – marŝado kaj biciklado inter nekutimaj formaĵoj de karsta montaro kun belvidoj al larĝa ĉirkaŭaĵo

Turisma informcentro de Rožňava

Námestie baníkov 32, 048 01
 Rožňava
 Tel.: +421 58 732 81 01
 tic.roznava@stonline.sk

Turisma informcentro de Dobšiná

Námestie baníkov 384
 049 25 Dobšiná
 Tel.: +421 58 794 11 54
 tic@dobsina.sk
 www.dobsina.sk (nur en la slovakia)

www.ssj.sk



Karpataj fagaj praarbaroj

Ĉarmo de senmakula naturo


Neĝenata trankvilo, bonefika silento, pitoreskaj romantikaj anguletoj kaj la plej diversa belo de senmakula naturo kun eksterordinara kaj ĉarma etoso estas sperteblaj en la belega medio de la netuŝitaj **karpataj fagaj praarbaroj**, en la oriento de Slovakio.

La protektataj lokoj de la konservitaj fagaj praarbaroj **Stužica**, **Rožok** kaj **Havešová** troviĝas en la plej nova slovakia nacia parko, Národný park Poloniny, kiu etendiĝas en la montaro Bukovské vrchy. La arbaro **Vihorlat-ský prales** situas en la plej arboriĉa protektata regiono de Slovakio noma-

ta Vihorlat en la montaro Vihorlatské vrchy. Ĉiuj kvar elstaraj teritorioj de valora kaj netuŝita naturo estis aldonitaj en 2007 al la Listo de la monda heredaĵo de Unesko, apud gravaj naturaj unikaĵoj kiel la mondfama nacia parko Yellowstone kaj Grand Canyon en Usono, Galapagoj en Ekvadoro, Sagarmatha en nepala Himalajo aŭ Kilimanĝaro en Afriko.

La **karpataj fagaj praarbaroj** estas unikaj originaj arbaroj, kiuj ne estis tuŝitaj de civilizo kaj de la senkompata mano de homo. Eblas sperti tie neforgeseblan kaj hodiaŭ jam raran

etoson de natura medio de vera arbaro, plena je vivo kaj je misterplenaj juveloj de naturo. Ili montras, kiel arbaroj aspektis antaŭ jarcentoj. La ĉefa kreskaĵo estas fago, kiu kreskas ĝis 40 metroj kaj povas vivi ĝis impesa aĝo 250 jaroj. La potencaj mutaj atestantoj de la pasinteco ekde jarcentoj protektas la hejmon de siaj loĝantoj kaj estas rifuĝejo por multaj specioj de bestoj kaj kreskaĵoj, hodiaŭ minacataj aŭ eĉ malaperintaj de aliaj lokoj. Altaj montoj, belegaj profundaj valoj kaj tipaj etaj kaldronoj kreas sekurlokon kaj neĝenatan trankvilon ankaŭ por raraj bestoj kiel bruna urso, lupo,



Eŭrazia linko kaj eĉ Eŭropa bizono kaj alko.

La nekutiman belecon de la tiea eksterordinara pitoreska naturo eblas sperti nur laŭ markitaj turismaj vojoj kaj instruaj padoj, aŭ kun profesia turisma ĉiĉerono kun speciala permeso.



Unu el la ĉefaj elirpunktoj por eniri tiujn ĉi vidindajn praarbarojn estas la plej orienta municipo de Slovakio, Nová Sedlica, kie komenciĝas ankaŭ turisma vojo kondukanta tra la nacia natura rezervejo **Stužica**. Ĝi estas sovaĝa karpata praarbaro kun multe da grandegaj fagoj, abioj kaj aceroj. Blanka abio, konata pro sia longa vivo, kiu povas atingi eĉ 500 jarojn, estas vera reĝo de la arbaro. La plej malnova kaj preskaŭ 50 m alta abio estas pli ol 300-jara kaj la ĉirkaŭmezuro de ĝia trunko estas pli ol 5 metroj.

Por homoj, kiuj ŝatas naturon kaj admiras ĝian perfektan harmonion, kiuj volas sperti la brueton, odoron kaj buntajn kolorojn de la arbaro, kiuj volas plenanime enspiri puran aeron, ripozi en eksterordinare trankvila medio ĉirkaŭata de bonefika silento kaj ankaŭ malkovri nekonatajn anguletojn, la karpataj fagaj praarbaroj estas la ĝusta loko por ripozo.

Ekskursaj rekomendoj

Bio-banejo Sninské rybníky – natura banejo uzanta teknikon de mempurigo de akvo per kreskaĵoj kaj algoj

Astronomia observejo en Kolonické sedlo kun la plej granda teleskopoj en Slovakio

Lignaj preĝejoj en Ruský Potok, Uličské Krivé, Topoľa kaj Kalná Ráztoka – ortodoksa kaj grekkatolikaj preĝejoj kun unika ligna arkitekturo

Turisma informoficejo de Snina

Strojárska 10, 069 01 Snina
Tel.: +421 57 16 186
+421 57 768 57 35
unitur@stonline.sk

Porklienta kaj informa centro de Humenné

Staničná 1, 066 01 Humenné
Tel.: +421 57 788 10 51
zc.humenne@stonline.sk
www.humenne.sk
www.sopsr.sk/nppoloniny/



Fujaro kaj ĝia muziko

Trezoro kaŝiganta en ligno

Neapartigebla parto de la slovakaj historio kaj riĉa popola kulturo estas tipa blovinstrumento: fujaro (lignofajlo, slovake *fujara*), kiun, kune kun ĝia nostalgia kaj balada muziko, enmetis en 2005 Unesko en la Liston de la nemateria kultura heredaĵo de homaro.

La naskiĝloko de tiu ĉi reĝo inter tradiciaj popolaj muzikiloj estas konsiderataj la regionoj de centra Slovakio. Onidire fujaro estis komence uzata nur por sendi signalojn, sed ĝiaj rimarkindaj mornaj tonoj kondukis al ĝia pli vasta uzado kiel muzikilo. Tiun ĉi longegan fluton kun tri truoj ludis paŝtistoj dum paŝtado de ŝafoj, sed ankaŭ dum diversaj festoj kaj funebraj okazaĵoj. La originaj temoj de fujaraj kantoj devenis de ĉiutaga vivo, famaj ĝis hodiaŭ estas diversaj kantoj kun paŝtista, ama aŭ rabista temo.

Tiu ĉi impona muzikilo estas farata ĉefe el sambuka ligno, kiu havas molan mezokarpon, estas bone prilaborebla kaj havas bonegajn sonajn kvalitojn. Krom belega specifa sono



fujaro havas ankaŭ grandegan artan valoron. Ĝi estas ne nur malfacila por produkti, sed ankaŭ la unika kaj fascina ornamo postulas kapablon kaj kreemon. La tradiciaj ornamaj motivoj, plej ofte inspiritaj de la naturo, estas gravurataj per acido.

Vi povas ĝui la sorĉan kaj melankolian muzikon de fujaro dum pluraj folkloraj festivaloj, kiuj okazas regule en Slovakio ekde printempo ĝis aŭtuno.

Ekskursaj rekomendoj

Celoslovenská prehliadka fujarášov – tutslovakia parado de fujaristoj okazanta en julio en Korytárky kaj dediĉita al fujaro kaj ĝia muziko

Celoslovenské stretnutie fujaristov v Čičmanoch – tutslovakia renkontiĝo de fujaristoj okazanta en septembro en la uniksila vilaĝo Čičmany, meze de vilaĝaj pentritaj lignaj dometoj

Slovaka turisma agentejo



Ĉefa oficejo

Slovenská agentúra pre cestovný ruch
(Slovaka turisma agentejo)
Lamačská cesta 8
811 04 Bratislava
Slovenská republika
Tel.: +421 2 50 700 801
Fakso: +421 2 55 571 654
Retpoŝto: sacrba@sacr.sk
www.sacr.sk, www.slovakia.travel

Oficejo en Banská Bystrica

Slovenská agentúra pre cestovný ruch
Námestie L. Štúra 1, P. O. Box 35
974 05 Banská Bystrica
Slovenská republika
Tel.: +421 48 413 61 46
Retpoŝto: sacr@sacr.sk

Eksterlandaj oficejoj

Ĉeĥio
Slovenská agentura pro cestovní ruch
Klára Badinková
Jilská 16
110 00 Praha 1
Česká republika
Tel.: +420 224 946 082
Poŝtel.: +420 776 765 477
Retpoŝto: office.cz@slovakia.travel

Hungario
Szlovák Idegenforgalmi Hivatal
Soňa Jelínková
Rákóczi út 15
H 1088 Budapest
Magyarország
Tel.: +36 1 429 00 49
Poŝtel.: +36 30 434 13 68
Retpoŝto: office.hu@slovakia.travel

Germanio
Slowakische Zentrale für Tourismus
Ingrid Sorat
Hildebrandstr. 25
D - 10785 Berlin
Deutschland
Tel.: +49 30 259 426 40
Fakso: +49 30 259 426 41
Retpoŝto: office.de@slovakia.travel

Pollando
Narodowe Centrum Turystyki
Ślowackiej
Ján Bošnovič
ul. Krakowskie Przedmieście 47/51
00-071 Warszawa
Polska
Tel.: +48 22 827 00 09
Poŝtel.: +48 606 236 044
Retpoŝto: office.pl@slovakia.travel

Aŭstrio
Slowakische Zentrale für Tourismus
Daniel Lukáč
Handelskai 265
A - 1020 Wien
Österreich
Tel.: +43 1 513 95 69
Poŝtel.: +43 650 911 40 90
Retpoŝto: office.at@slovakia.travel

Rusio
Представительство Словакии
Управления по Туризму
Евгения Алушицкая
Посолство Словакии Республики
Ул. Ж. Фучика 17-19, 123 056 Москва
Российская Федерация
Tel.: +7 499 251 76 31
Retpoŝto: office.ru@slovakia.travel



Spišský hrad

Eldonita: 10/2015

Aŭtoro: Slovenská agentúra pre cestovný ruch

Teksto: Slovenská agentúra pre cestovný ruch

Fotoj: archiv SACR L. Struhár, R. Buga, A. Vojček, M. Sabo, D. Bugár, M. Nikolaj, J. Lacika, M. Črep, A. Jiroušek, B. Schreiber

Dizajno kaj presado: Slovenská Grafia, a.s., Bratislava

Kunordiganto de la projekto:

Cortes, Smith & Co. Slovakia, s.r.o., Bratislava

Traduko: Matthieu Desplantes

Provlego: Katarína Nosková



Eŭropa Unio



OPERAČNÝ PROGRAM
KONKURENCIESCHOPNOSŤ
A HOSPODÁRSKY RAST

Ĉi tiu materialo estis kunfinancata de la Eŭropa Unio per la operacia programo Konkurkapablo kaj Ekonomia Kreskado.



Eŭropa Unio



OPERAČNÝ PROGRAM
KONKURENCIESCHOPNOST
A HOSPODÁRSKY RAST

Ĉi tiu projekto estas kunfinancata de la Eŭropa
Fonduso de Regiona Evoluo.

Ĉi tiu broŝuro estas nevendebla.